# Alparolo de Universala Esperanto-Asocio

*dum la debato pri ĝenerala politiko*

*42ª sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, en novembro 2023*

*teksto legita de*

**François Lo Jacomo**

Sinjorino prezidanto,
Ekscelencoj,

Sinjorino Ĝenerala Direktoro, en via enkonduko al tiu ĉi debato pri ĝenerala politiko, vi diris: "ne estas facile trovi komunan lingvon, kiun 194 membroŝtatoj povas paroli kune". Nia organizo, Universala Esperanto-Asocio, povas helpi vin pri tio.

La 26-an de julio 1887 aperis la unua manlibro de la internacia lingvo de Doktoro Esperanto, la doktoro, kiu esperas, kaj malgraŭ ĉiuj obstakloj, kiuj stariĝis antaŭ ĝi, Esperanto estas nun parolata de milionoj da homoj en pli ol cent landoj. Nia asocio prezidas la Komitaton pri Lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Jam antaŭ pli ol cent jaroj, la landoj favoraj al Esperanto ene de Ligo de Nacioj reprezentis duonon de la monda loĝantaro. Unesko plurfoje subtenis nin, per rezolucioj en 1954 kaj 1985, kaj per diversaj mesaĝoj, inkluzive de vi, Sinjorino Ĝenerala Direktoro. Ni tre dankas al vi pro tio.

Kiam, antaŭ pli ol kvardek jaroj, la eminenta esperantisto kaj tradukisto Claude Piron diris al mi, ke la ĉefa malfacilaĵo por interkompreno ne estas la lingvoj mem, sed la kulturaj diferencoj, mi unue miris. Sed danke al Esperanto, tio iĝis evidenta: ne sufiĉas paroli la saman lingvon por kompreni unu la alian. Tamen, ĉi tiu malfacilaĵo ne estu malhelpo, ĉar precize tiu kultura diverseco igas nian mondon riĉa: ĉiu diferenco estas kolora subtileto, kiu aldoniĝas al nia granda tutmonda mozaiko. La vivo estas tro mallonga por studi la 8 300 lingvojn, kiujn via atlaso listigas, sed se anstataŭ dediĉi dekojn da horoj al penado pri la neregulaj verboj de

unu el ili, ni tre rapide aliras, danke al simpla kaj senescepta lingvo, jenan duan etapon: interkultura dialogo, ni realigas konsiderindan paŝon al pli bona interkompreniĝo, do al paco.

Nia asocio aktive partoprenas en la festado de la Internacia Tago de Paco, sed ankaŭ en la disvastigo de Unesko-sciindaĵoj, danke al la Esperanta versio de *Unesko-Kuriero*. Nia venonta Universala Kongreso, ĉe la piedo de Kilimanĝaro, en Tanzanio, vigle akcelos la praktikadon de Esperanto sur tiu ĉi rapide progresanta kontinento. Kaj multaj esploroj, precipe danke al la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kiu akompanas nin en ĉi tiu Ĝenerala Konferenco, pruvas, ke lernado de Esperanto faciligas postan lernadon de aliaj lingvoj. Ni ofertu al niaj infanoj ĉi tiun potencan ilon por pli bone interkompreniĝi.